

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №4



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №4 (310)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2022

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2021, №4 (310).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 28 декабря 2021 г.

| | |
|--|-----------|
| Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> | 2 |
| En ĉi tiu numero | 3 |
| Temo | 5 |
| Paweł Fischer-Kotowski. Halina Gorecka: La Esperantisto de la Jaro 2021 | 6 |
| Paweł Fischer-Kotowski. "La pandemio efikis duflanke: negative kaj pozitive" (Intervjuo kun Halina Gorecka) | 7 |
| Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2021 | 10 |
| Ronda Tablo | 11 |
| Niaj atingoj kaj malsukcesoj dum 2020-2021 (Peter Baláž, Hans Becklin, Stanislav Belov, Dennis Keefe, Léon Kamenický, Vinko Markovo, Albert Stalin T. Garrido, Giorgio Silber, Trezoro Huang Yinbao, Anna Löwenstein, Humphrey Tonkin, Przemysław Wierzbowski)..... | 12 |
| Eventoj | 20 |
| Janne Grimaud. Zamenhof-Tagoj revenis al Bjalistoko | 21 |
| Povilas Jegorovas. Litovio: Optimismo kaj espero malgraŭ la pandemio | 23 |
| Ĵenja Amis. Montrealo: Ne-Zoom-a Zam-Festo! | 26 |
| La lingvo de unueco – Zamenhofa Tago 2021 | 28 |
| Irina Gonĉarova. Moskvanoj festas Zamenhof-Tagon | 29 |
| Konatiĝu kun Aloyzas Gudavičius..... | 30 |
| Povilas Jegorovas. La organiza komitato de BET-56 | 31 |
| Povilas Jegorovas. BET-56 en Klajpedo: pli ol cent aliĝintoj | 32 |
| Antanas Visockas. La ekskursi programo de BET-56 | 33 |
| Lode Van de Velde. Benelukso: Surprize multaj kongresanoj | 36 |
| Heinz W. Sprick. 18a Rata Rendevuo en Porta Westfalica kaj Bückeburg | 37 |
| Irina Gonĉarova. Arĝenta jubileo en Ĉeboksaro | 38 |
| Irina Gonĉarova. Novembra festkunveno en Moskvo | 40 |
| Ilona Koutny. UAM: Interlingvistikaj Studoj en nova formo | 41 |
| La Akademio de Esperanto: Laŭro kaj konferenco | 43 |
| Zhao Wenqi. La kurso en Jiangsu-a Teknologia Universitato: nur rete | 44 |
| Ĉina Radio ne plu en Esperanto | 45 |
| Elekto de komitatoj B de UEA: kandidatiĝu! | 46 |
| Finan elano: la dua fazo de la kampanjo de UEA por antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio | 47 |
| Aleksander Korĵenkov. La arkivo de UEA migros al Vieno | 47 |
| TEJO en Speciala Konsulta Rilato kun UN | 48 |
| Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Funebraj notoj | 49 |
| Tribuno | 50 |
| Stanislav Belov. Bonvenon al Armenio: sugestoj por vojaĝantoj | 51 |

| | |
|--|------------|
| Ian Fantom. De kie fontos nova movado? | 56 |
| Skeptiko pri la savo de la Universala | 63 |
| Martin Schäffer. Tute ne estas kaŭzo por pesimismado | 63 |
| Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Homaj Rajtoj | 65 |
| Mesaĝo de UEA okaze de la Zamenhofa Tago | 66 |
| Massimo Acciai. 30 oraj horoj: Nova projekto de ILEI | 67 |
| Arkivo | 68 |
| Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2022 | 69 |
| Aleksander Korĵenkov. SEJT-23: Pli ol 50 fotoj de antaŭ 40 jaroj | 71 |
| Kulturo | 72 |
| Venedikt Jerofejev. Moskvo – Petuŝki: Fragmentoj (Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov) | 73 |
| Laimundas Abromas. Vilaĝa historio | 100 |
| Povilas Jegorovas. Bibliografio de Vytautas Ŝilas | 103 |
| Jean-Luc Tortel. La Diaj donacoj | 104 |
| Paulo Sérgio Viana. La tereno | 107 |
| Wolfgang Kirschstein. Abdulrazak Gurnah | 113 |
| Ĵenja Amis. La faruno | 115 |
| Miguel Fernández. Vortripeto kiel elemento de versfarado: Tri poemoj neordinaraj plus unu omaĝa | 116 |
| Paulo S. Viana. Rava potenco de imagemo (Recenzo: Laure Patas d'Illiers. <i>Sur bluj planedoj</i>) | 123 |
| Halina Gorecka. Konfesi tion, kion oni kredas (Recenzo: Wojciech Koronkiewicz. <i>Kun Dipatrino sur biciklo: Vojaĝo al mirindaj bildoj, ikonoj kaj sanktaj fontoj de Podlaĥio</i>) .. | 124 |
| Dimitrije Janičić. Pri Esperanto en aliaj lingvoj (Recenzo: Златоје Мартинов. <i>Историја эсперантске књижевности</i>) | 126 |
| Floréal Martorell. <i>Amo kaj Perforto</i> : La debuta albumeto de <i>Ekde Tiam</i> | 127 |
| Aleksander Korĵenkov. <i>Kvin rakontoj</i> de Dostojevskij: Nova senpaga libro | 128 |
| Aleksander Korĵenkov. La tria ĉi-jara <i>Unesko-Kuriero</i> | 129 |
| <i>Literatura Foiro</i> №313 kun suplemento | 129 |
| Miguel Gutiérrez Adúriz. Belartaj Konkursoj de UEA 2022 | 130 |
| Mozaiko | 132 |
| Stanislav Belov. Novjaraj ŝercoj | 133 |
| István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj | 134 |
| Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i> | 135 |
| Reklamo | 136 |

Kovropaĝe: Al niaj legantoj ni deziras Gajan Kristnaskon kaj Bonan Jaron 2022!
(Publika foto de Jacob Lund - stock.adobe.com)

Temo



Je la Zamenhof-festa renkontiĝo en Bjalistoko estis proklamita la Esperantisto de la jaro 2021. Halina Gorecka ricevis ĉi tiun prestiĝan titolon “pro la senlaca laboro por la eldonejo “Sezonoj” (121 libroj) kaj la revuo “La Ondo de Esperanto” (309 numeroj)”. La supra foto montras ŝin en la skanseno “Malyje Korely” apud Arĥangelsko, kie ŝi ĉi-aŭtune partoprenis nefrologian konferencon (*Foto: Oksana Suĥareva*).

Halina Gorecka: La Esperantisto de la Jaro 2021



La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016), Trezoro Huang Yinbao (2017), Hori Jasuo (2018), Anna Löwenstein (2019) kaj Fernando Maia Jr. (2020).

En 2021 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 24a fojo. Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis rekordan nombron de 26 kandidatoj, al kiuj 17 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Halina Gorecka – 6 voĉoj

Ahmad Mamduhi, Jérémie Sabiyumva – po 5 voĉoj

Floréal Martorell – 4 voĉoj

Ilija Sumilfia Dewi, Barbara Pietrzak – po 3 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po du voĉojn, sep kandidatoj ricevis po unu voĉon.

La Ruslanda esperantistino **Halina Gorecka** estas elektita pro la senlaca laboro por la eldonejo *Sezonoj* (121 libroj) kaj la revuo *La Ondo de Esperanto* (309 numeroj), kies eldonanto kaj administranto ŝi estas. Dum la jaroj 1998-2017 Halina Gorecka estis sekretario de la elektokomisiono pri La Esperantisto de la Jaro, kaj laŭ la regularo la komisionanoj tiutempe ne rajtis proponi ŝin kiel kandidaton por ĉi tiu titolo.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2021 Halina Gorecka!

Paweł Fischer-Kotowski
sekretario

“La pandemio efikas duflanke: negative kaj pozitive”

Intervjuo kun Halina Gorecka, la Esperantisto de la Jaro 2021

Kiel vi reagis, kiam vi eksciis, ke vi estas la Esperantisto de la Jaro 2021? Dum dudek jaroj vi estis sekretario de la elektokomisiono, kaj vi estis tiu, kiu sciigis la laŭreatojn pri ilia elekto. Tio estas agrabla tasko (mi ja bone scias!), kiel estas ĉe la alia flanko?

Prave, dudek fojojn mi anoncis la rezulton de la vica elektado, kaj varmigis mian koron la memoro pri ĉi-okazaj telefonaj interparoloj kun Bill Auld aŭ Michel Duc Goninaz, kiu ŝerce demandis, ĉu la esperantisto nur de la jaro, ne de la jardeko? Ni uzis la Zamenhof-festojn por solene anonci la rezulton en Jekaterinburgo, Kaliningrado, Kaŭno, Berlino... Kaj tute surprizan sciigon mi ricevis de vi, Paŭlo, pri la atribuo de la titolo al mi. Sincere, mi neniam pensis aŭ revis pri tia honoro, ja estas tiom da indaj personoj, des pli, ke mi neniel elstaris en la finiĝanta jaro. Mi tutanime dankas al la elekta komisiono pro la honoro kaj dediĉas ĉi tiun elekton al miloj da senlacaj pacaj batalantoj en diversaj roloj kaj pozicioj sur tre diversaj kampoj.

Kiujn kandidatojn vi mem proponus por Esperantisto de la Jaro 2021?

Se mi estus membro de la elekta komisiono, mi konsiderus tiujn aktivadojn, kiuj estis aparte gravaj pro la pandemio kaj kandidatigus jenajn personojn: Petro Baláž pro la kreo de la virtual-kongresa sistemo, kunordigo kaj kapablo de la teamo kiu ĉi-jare migris al alia urbo; Aleksander Korŝenkov pro la ĉiutaga aperigo de informoj en nia novaĵretejo kaj pro lia daŭra tradukado de defie malfacilaj tekstoj, ĉi-jare: Pasternak, Solŝenicyn, Rasputin kaj Jerofejev. (Petro kaj Aleksander laŭreatiĝis pli frue, sed kial ne denove? Nombro la Orajn Pilkojn de Messi kaj Ronaldo en la futbala mondo.) Vivigo de niaj kulturcentroj estas grava tasko kaj tre malfacila en la nunaj kondiĉoj, tial inter miaj kandidatoj estus Bert Schumann, kies laboro kun la sindonema teamo ebligis subteni la funkciadon de la kastelo Greziljono, fari riparlaborojn kaj daŭrigi la tradiciajn aranĝojn en la kastelo malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj.

Mi jam havis la okazon intervui vin antaŭ du jaroj okaze de via jubileo. La tiama intervjuo titoliĝis “Hobio, kiu iĝis profesio”. Efektive, vi estas inter la bonŝanculoj, kiuj perlaboras la monon per ŝatata aktivado (kaj ricevas premion por tio!). Kiel vi klarigas al neesperantistaj amikoj pri kio vi okupiĝas?

Mia medio dum jardekoj estis ĉefe esperantista, kaj okazoj menciis mian laboron ekster ĉi tiu medio ne estis tro oftaj. Oni miras, ke eblas vivteni sin per la eldona agado (ĉefe esperantistoj pri tio miras, sciante la etecon de nia merkato), kaj iuj ne

nur miras, sed admiras. Kutime mi diras, ke mi kaj mia edzo eldonas (inter)lingvistikan revuon por malvasta rondo de fakuloj, se oni plu scivolemas, mi aldonas, ke ĝia enhavo rilatas al la lingvo Esperanto kaj al la agadoj ĉirkaŭ ĝi.

Kiam ni interparolis antaŭ du jaroj, la pandemio estis ekster nia imagopovo kaj nun ĝi forte influas nian ĉiutagecon. Ĉu la novaj cirkonstancoj ŝanĝis ion en via laboro? Kaj kiel vi taksas ilian influon al la Esperanto-movado?

La pandemio grave influis al nia laboro, kaj tiu influo estas negativa. Kvankam ni ne bezonis reorganizi nian "internan" laboron, ja dum tridek jaroj ni laboras hejme ĉe komputilo kaj tenas kontaktojn per interreto (ekde 1993). Sed librovendoj ŝrumpis pro limaj kaj poŝtaj obstakloj, ankaŭ neokazigo de ĉeestaj aranĝoj kontribuis al tio. Ni devis prokrasti presadon de la planitaj libroj kaj estas kontentaj, ke ni jam pli frue, antaŭ la pandemio, transiris al elektronika eldonado de *La Ondo de Esperanto*.


Se paroli pri la influo al la Esperanto-movado ĝenerale, la pandemio efikis duflanke: negative kaj pozitive. Unu el la plaĉaj flankoj de la Esperanto-aktivado estas renkontiĝoj. Dum la pandemio kunvenoj maleblis, la planitaj aranĝoj, inkluzive de la UKoj, estis nuligitaj, kaj oni sukcese adaptis sin al la situacio okazigante retajn kunvenojn kaj virtualajn kongresojn. Unuflanke tio ebligis partoprenon sen limaj, vizaj, financaj baroj, sed perdiĝis la sento de homa proksimeco kaj varmeco, kiam brakumo estas ne virtuala, sed reala. Aliflanke, abundo de retkunvenoj kondukas al laciĝo pro la virtualeco kaj al apatio, malpliigis kvanto de retejaj vizitantoj. Interesas min, kiujn vizit-statistikojn dum la pandemia periodo notas Esperantaj retaj radioj.

Esperanto certe okupas multan tempon en via vivo. Ĉu vi havas liberan tempon? Se jes, kiuj estas viaj plej gravaj okupoj ekster Esperantujo?

Post transiro al la sezona eldonritmo de *La Ondo* mi havas pli multe da tempo por mia aktivado en la pacienta movado, kie mi utiligas miajn spertojn el la Esperanto-movado: ekde sekretariado kaj kunordigado ĝis gvidado de projektoj kaj de nia organizaĵo, aldone verkado, redaktado kaj similaj aferoj. Veran hobion, kiel pupfardo, trikado, pentrado k. s. mi ne havas. Mi ŝatas vojaĝi, promeni piede, iom bicikli, viziti artmuzeojn kaj aliajn interesajn lokojn. En Kaliningrado mi ekŝatis printempon kaj fruan someron, kiam floradas arboj kaj arbustoj, kaj mi ĝuas tion.

Ne povas manki la tradiciaj demandoj... Kiujn tri librojn en Esperanto vi kunportus al neloĝata insulo?

Ne estas facila demando al la iama direktoro de la Kolektiva Esperanto-Biblioteko, kiun mi flegis en Jekaterinburg-Sverdlovsk, ja tra miaj manoj pasis tiomego da libroj. Hm... nu, la novelaro *Kain kaj Abel* de Sándor Szathmári por revoki memorojn pri la rondo de la junaj uralaj literaturŝatantoj, *Homarano* de Aleksander Korĵenkov por koncentri sin je la grandioza personeco de Zamenhof, kaj *Studoj pri la Esperanta literaturo* de Vilmos Benczik.



Halina, Aleksander kaj ilia enciklopedio (Foto: Aleksej Korjenkov)

La antaŭlasta demando: kiujn planojn vi havas?

Se temas pri Esperanto, miaj planoj ne ŝanĝiĝis de tiuj, anoncigitaj antaŭ du jaroj – “mi ŝatus iam pretigi almenaŭ unu broŝuron surbaze de miaj artikoloj en *La Ondo*, eble el la historio de Sukcena Lando. Mi daŭrigos kompostadon de recenzoj el la beletra almanako *Sezonoj*”. Sed nun mi ne estas tiom optimisma pri realiĝo. Mi esperas, ke ni reaktivigos nian podkastan servon *Radio Esperanto*.

En esperantistaj retdiskutoj oni vidas multe da pesimismo pro la stagnado aŭ krizo en pluraj tradiciaj movadaj strukturoj. Kion vi opinias pri la nuna stato kaj estonteco de Esperanto?

Verŝajne, ni travivas nun la periodon, kiam la novaj agadformoj prenas pli fortan kaj pli gravan pozicion, sed la malnovaj strukturoj sen ĝustatempe transformoj velkas kaj ludas malpli gravan rolon. Ĉi tiu situacio povas ĉagreni iujn, sed longperspektive subteni la arkaikintajn strukturojn similas al plua persistado pri ĉevaloj, kiam la estonteco klare estis por aŭtomobiloj. Grandaj strukturoj estas malfacile transformeblaj; mi bedaŭras, ke mankis politika volo por ĝustatempe iniciati necesan transformiĝon de la tradicia movado, kies stato nun ŝajnas simili al agonio. Malgraŭ tio Esperanto kiel lingvo kaj komunumo havos sian modestan, sed firman lokon en la mondo, kaj eble estos ankoraŭ okazo por ĝia nova rolo.

Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2021

Proponantoj

Marija Belošević (Kroatio): prezidanto de IKUE

Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto, akademi-
ano

Renato Corsetti (Britio): akademiano, eksprezidanto de UEA

Klára Ertl (Hispanio): eksestrarano de TEJO

Albert S. T. Garrido: vicprezidanto de TEJO (Filipinoj/Hispanio)

Edmund Grimley Evans (Britio): akademiano, eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano

Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto, recenzisto, akademiano

Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro, akademiano

James Rezende Piton (Brazilo): konsilanto de BEL, aktivulo de Filatelista Esperanto-Ligo

Sibayama Zyun'iti (Japanio): estrarano de JEI, ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*

Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de Amikumu

Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ

Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto

Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libro-
servo, komitatano de ĈEL

Elektantoj

Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I

Osmo Buller (Finnlando): eksa Ĝenerala Direktoro de UEA

Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH

Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE

Mireille Grosjean (Svislando): eksprezidanto de ILEI, prezidanto de Svisa Esperanto-
Societo

Anne Jausions (Francio): eksprezidanto de OSIEK

Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*

Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM

Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net, akademi-
ano

Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko, akademiano

Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): vicprezidanto de UEA, direktoro de Esperanto-Centro

Ora Ponto

Vasil Kadifeli (Turkio): tradukanto, eldonanto de *Turka Stelo*

Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAOEM

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo
en Lesjöfors

Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de *Monato* pri ekonomio

Syōzi Keiko (Japanio): membro de la Redakta Fakto de JEI, iniciatinto de *Libroteko Tokio*

Przemysław Wierzbowski (Pollando): prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo

Sekretario

Paweł Fischer-Kotowski

Ronda Tablo



Multaj el la respondintaj al nia tradicia jarfina enketo menciis, kiel sukceson, okazigon de virtualaj aranĝoj en la reto. Eĉ se ili estas nur surogata anstataŭaĵo de la reala kunestado, retkunvenoj iĝis bona rimedo por la agado de niaj komitatoj, estraroj ktp. Ĉu ĉi tiu moderna labormaniero penetrus en Esperantujon, se ne okazus la koronavirusa pandemio?

Niaj atingoj kaj malsukcesoj dum 2020-2021

Dum pluraj jaroj *La Ondo de Esperanto* petis konatajn Esperanto-aktivulojn respondi la demandon: “Kiu(j) Esperanto-evento(j) dum la pasinta jaro, laŭ via opinio, estis la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?” Sed pro la koronavirusa pandemio, pasintjare ni decidis ne okazigi nian tradician Rondan Tablon por 2020. Nun ni revenas al la tradicia “Ronda Tablo” kaj petas respondi, unue, la demandon pri la atingoj kaj malsukcesoj en Esperantujo dum la du pandemiaj jaroj 2020-21, kaj due, la demandon pri la persona Esperanto-aktivado dum ĉi tiu periodo.

Peter Baláž (Slovakio) Kunordiganto de E@I

1. Negativa estas certe la ĝenerala nuligo de multegaj Esperanto-aranĝoj, inkluzive de la plej grandaj (UK kaj IJK) kaj forta limigo de internaciaj/transnaciaj personaj kontaktoj. Pro tiu ĉesigo de kontaktoj suferis/as ankaŭ personaj interrilatoj, amikecoj kaj entuziasmo pri Esperanto ĉe pluraj. Same certe malgrandiĝis kvanto da venditaj sed ankaŭ eldonitaj Esperanto-libroj.

Pozitiva estas la fakto, ke ankaŭ nia movado sukcesis parte (kaj mirinde rapide) adaptiĝi al la nova situacio kaj proponis al siaj membroj plurajn virtualajn aranĝojn, inkluzive de la plej granda “Virtuala kongreso”, kiun ni ene de E@I havis la okazon teknike prizorgi.

Virtualaj eventoj ankaŭ donas ŝancon al homoj, kiuj pro diversaj kialoj ne povus partopreni niajn eventojn vive. Ili almenaŭ tiel ĉi distance povas senti sin pli proksimaj al la komunumo, povas pli aktive partopreni kaj senti la ligan inter ni.

2. Tiu ĉi jaro (2021) estis por mi (kaj por E@I ĝenerale) verŝajne la plej malfacila. Krom adaptiĝo al la “nova mondo”, kun haltigo de pluraj eventoj, kiujn ni organizas (kiuj estis/as parto de nia ĉiutaga vivo/laboro) ni translokiĝis al alia urbo en Slovakio (Nová Dubnica). Kun tio ligiĝis multaj taskoj, laboroj, kiujn necesis fari apud la kutima vivo kaj laboro. Ni ekhavis Esperanto-domon, aldone stokejon/arkivon kaj fine ankaŭ oficejon. La laboroj daŭre ne estas finpretaj, tamen ni jam funkcias “normale”. Sed tiu streĉo kaj ŝarĝo certe influis ĉi-jaron.

Ni tamen estas ĝojaj, ke la plej komplika parto jam estas malantaŭ ni kaj ke ni povos en 2022 komenci novan etapon – ankaŭ pli proksiman kunlaboron kun UEA (ekzemple, pri la organizado de UKoj kaj estonte ankaŭ pri la libroservo). Nia celo estas multe pli forte fokusiĝi al poresperanta agado – tien ni direktos niajn fortojn kaj energion dum sekvaj monatoj kaj jaroj.



Hans Becklin (Usono)
estrarano de ESF,
komitatano A de UEA por TEJO
komitatano Ĉ de TEJO
reprezentanto de TEJO ĉe UN



1. Plej pozitivaj estis la interretaj renkontiĝoj, kiuj ne nur provis reprodukti niajn (ofte tedajn kaj neaktivigajn) kongresojn, sed kiuj alproprigis al si la spiriton de la Zamenhofa revo de homoj kun homoj, adaptante sin por taŭgi ne nur al angloj kun francoj aŭ al rusoj kun poloj, sed al multe pli heterogena, internacia grupo, kiu konas kulturajn, horzonajn, kaj ekonomiajn barojn multe pli altajn ol la bonhavaj pioniroj, kiuj renkontiĝis en Bulonjo. Tion ebligas la elstara retejo “Eventa Servo”, kies kreintojn mi laŭdas kiel aŭguristojn, heroldojn kaj iniciatintojn de nia nova reta epoko.

Kiel instruisto, mi rimarkas, ke ĉi tiuj renkontiĝoj fakte naskas ofte pli bone Esperantistojn, ne nur pro la multe pli granda ofteco de ili, sed ankaŭ pro pli da diverseco en la parolantaro alfrontita. Ne plu la idiolekto (aŭ idiotolekto) de iu grupo povas cikatriki la Esperanton de entuziasma novulo, ĉar li povos de la komenco paroli kun plej diversaj Esperantistoj. Ĉu sonoru la belfridoj por la klasika klubo funebre? Eble estas tro frue, ĉar multaj kluboj – ekzemple tiuj de Antverpeno, Londono, Notinghamo, Ĉikago, Parizo, Romo, Rio, Seulo ktp – provizas la tutmondan esperantistaron per siaj kvalitaj eventoj. Sed pli da kluboj, kiuj paŭzigis sian aktivadon atendante ĉeestajn eblojn, nun trovas sin balasto.

2. Persone negativa estis la devo kontenti pri la lokaj biero, vetero, kaj vivo anstataŭ povi gustumi la bufedon de la mondo. Sed tio, negativa de mia vidpunkto, estas nur pozitiva por nia klimato kaj por tiuj esperantistoj, kiuj neniam povis esperi plenan partoprenon en la internacia movado pro foro, politiko, aŭ ekonomiko. Ĉiu medalo du flankojn posedas! Mi partoprenis la du retajn Universalajn Kongresojn, la tri kongresojn de TEJO (inkluzive de la bonega Retoso, kiu montris la eblan sukceson de plena dekreto de la ĉeestaj normoj), instruis Esperanton al pli ol 100 progresantoj kadre de la unua kaj dua retaj okazigoj de NASK, kaj aldone ĉeestis amason da kunvenoj malpli grandaj.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



ESPERANTO
LA JUSTA INTERNACIA LINGVO
POR DIALOGO KAJ PACO

ZAMENHOF-TAGO

15/12/2021

Naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof
iniciatinto de la internacia lingvo
Esperanto





Ĉi-decembre, malgraŭ la pandemio, oni sukcesis festi la vican naskiĝdatrevenon de la unua esperantisto ne nur virtuale, sed ankaŭ en realaj Zamenhof-festaj renkontiĝoj en pluraj landoj. Raportojn pri kelkaj el ili legu en la sekvaj paĝoj.



Foto: Guaroa Emmanuel González Cuevas

Zamenhof-Tagoj revenis al Bjalistoko

La jaro 2021 estis grava jaro por la Bjalistoka Esperanto-Societo (BES). Ne nur estis la 30-jariĝo de la societo, sed ankaŭ la Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj denove okazis ĉeeste. La tradicia renkontiĝo de esperantistoj – organizata ĉiujare okaze de la datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof – estis plene reta en 2020 pro la pandemio. Kaj ĉi-jare, la 22aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj okazis en Bjalistoko de la 9a ĝis la 12a de decembro 2021, danke al la subteno kaj kunlaboro de Bjalistoka Kulturcentro / Centro Ludoviko Zamenhof kaj Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki. La naskiĝloko de la iniciatinto de Esperanto feliĉe bonvenigis homojn el la tuta Pollando, kaj el aliaj landoj, kiuj venis por prelegi, partopreni en diversaj renkontiĝoj de la programo Erasmus+ aŭ simple por havi agrablan tempon en la kompanio de aliaj esperantistoj.

La programo ja estis riĉa kaj varia kun proponoj laŭ ĉies gustoj. La evento oficiale komenciĝis vendrede, sed ĵaŭde vespere jam estis la malfermo de la ekspozicio “30-jariĝo de Bjalistoka Esperanto-Societo” kun fotoj kolektitaj speciale por la okazo. Ankaŭ la biblioteko – Esperanto-Libraro – estis malfermita dum la tuta renkontiĝo, tio ebligis libere foliumi aŭ aĉeti librojn. La plej granda parto de la aranĝo okazis en la Centro Ludoviko Zamenhof, kiu disponigis al la societo salonon kie ĉirkaŭ kvindek homoj povis spekti prelegojn pri diversaj temoj. Sed danke al la teknikistoj de la centro, la evento ankaŭ estis rete elsendita, do homoj kiuj ne povis

ĉeesti aŭ homoj kiuj maltrafis programo(j)n, havis la eblecon sekvi la eventon ĉe la Fejsbuk-paĝo de la Centro Ludoviko Zamenhof <https://mallonge.net/jl>.

Pri la prelegoj kaj prezentoj, literaturo estis ripetiga temo, Tomasz Chmielik prezentis novajn Esperanto-librojn (inter ili *Ŝuistoj* de Stanisław Ignacy Witkiewicz), Roman Dobrzyński parolis pri *Verda Simio*, Przemysław Wierzbowski rakontis pri la defioj de la tradukado de *Solaris* de Stanisław Lem... Kaj ni ne forgesu la resumon de la literatura konkurso „Kio okazis, kio okazos?“, dum kiu okazis enmanigo de premioj kaj prezento de *Bjalistokaj Kajeroj* (№11), disdonitaj al ĉiuj partoprenantoj.

Kompreneble, ankaŭ Esperanto fariĝis la temo de pluraj prezentoj. La partoprenantoj aŭdis pri la graveco de la lingvo Esperanto en la urbo Zagórnik (Paweł Nowak), la historio de Esperanto-simboloj kaj kiel krei efikan logotipon (Tim Owen), aŭ kial Esperanto sukcesis kaj malsukcesis en la mondo (prof. Walter Żelazny).

En sabato, la plej riĉa tago de la aranĝo, aliaj prezentoj kiel la testamento de Luter (Ágnes Ráczkevy-Eötvös), la agado de E@I en Slovakio (Lucas Rivière) aŭ la projektoj Erasmus+ ankaŭ helpis diversigi la eventon.

Por la artaj programoj estis invititaj la kantisto JoMo el Tuluzo (Francio), *Frey-Lech Trio* kaj *Uku-Donaco Bjalistoko*, loka muzika ensemblo, kaj Halina Rózanek kiu ludis la akordionon. *Mi estas Lidja*, monodramo de Paula Czarnecka pri Lidja Zamenhof reinterpretis la vivon de la plej juna filino de Ludoviko kaj Klara Zamenhof.

Inter la nemaltrafeblaj kaj fortaj momentoj de la semajnfino estis kompreneble la solena flormetado al la monumento de L. L. Zamenhof (al kiu ankaŭ partoprenis la urbestro de Bjalistoko), la tranĉado de la naskiĝtaga kuko, dum kiu la partoprenantoj renkontiĝis kaj babilis neformale kaj amike, kaj la anonco de la Esperantisto de la jaro 2021, Halina Gorecka.

Dimanĉo estas tradicie la ekskurso tago, do la partoprenantoj kiuj partoprenis la virtualan ekskurson pasintjare, povis sperti la viziton de la najbara urbeto Supraśl ĉeeste ĉi-jare. Ortodoksa monaĥejo, muzeo de ikonoj, muzeo de pres-arto kaj promenado tra la urbeto, gviditaj de Iza Walentynowicz kaj Nina Pietuchowska, estis inkluzivitaj en la programo, kaj ĉiuj ŝajnis ĝui la tagon. En Bjalistoko, katolika diservo en Esperanto okazis en la malnova paroĥa preĝejo kaj ankaŭ permesis al eksterlandanoj konatiĝi kun alia emblema loko de la urbo.

Krome, estas menciindaj la renkontiĝoj de tri projektoj de la programo Erasmus+ en kiuj BES partoprenas kaj kunordigas. Homoj el Francio, Italio, Hispanio, Nederlando, Germanio, Britio, Kroatio, Slovakio, Filipinoj venis al Bjalistoko por partopreni en “Reta Edukado Nun!”, “Volontulado kaj asocia daŭripov-evoluo” kaj “Trejnu la Trejniston!” – renkontiĝoj antaŭ kaj post la evento.

Lunde vespere okazis la lingvokafejo, kie la malmultaj partoprenantoj, kiuj restis en Bjalistoko, kaj lokanoj babilis Esperante en bona etoso.

Ni esperas (re)vidi vin venontjare, kun eĉ pli riĉa kaj interesa programo!

Jeanne Grimaud

Litovio: Optimismo kaj espero malgraŭ la pandemio

La finiĝanta jaro 2021 estis la dua eksterordinara jaro markita per daŭra pandemio. Kaj la tuta agado de Litoviaj esperantistoj same kiel en la tuta mondo estis stampita per tio. Tamen la Esperanta agado en Litovio ne ĉesis kaj ĉio kutima daŭris, kaj la rezultoj ne estas pli malbonaj ol dum kelkaj antaŭaj jaroj. La pandemio en Litovio malfortiĝas, la limigoj estas nemultaj. Tial la 11-12an de decembro en Kaŭno povis okazi la 56a Kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj 2021. Tamen multaj ne kuraĝis partopreni tiom amasan aranĝon kaj rezulte al Kaŭno venis nur 45 esperantistoj el ok Litoviaj urboj – proksimume duono de la ĉiujara kutima partoprenantaro.

La prezidanto de LEA Povilas Jegorovas faris la raporton pri la dujara agado de Litoviaj esperantistoj, ĉar pasintjare pro la severaj pandemiaj limigoj la kongreso kaj Zamenhof-Tagoj ne povis okazi. Tamen ĉi-sube estas menciitaj agadoj nur en 2021, ĉar simila artikolo aperis pasintjare pri 2020.

La agado daŭris laŭ kelkaj ĉefaj direktoj:

1. Daŭris migri tra Litovio ampleksa ekspozicio pri Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Dum 2021 ĝi estis montrita en ok novaj urboj. En ĉiu urbo ĝin akompanis intensa kaj vasta informa kampanjo pri Zamenhof kaj Esperanto. Ampleksaj artikoloj aperis en retejoj de tiuj urboj, en retejoj de tiuj institucioj, kie okazadis la

Kaŭno: Povilas Jegorovas raportas pri la asocia agado en 2020-21 (Marijus Dilba)



ekspozicio (publikaj bibliotekoj, kulturcentroj, muzeoj), en lokaj gazetoj kaj lokaj novaĵretejoj k. s. Tiamaniere la tuta loĝantaro de la konkreta urbo kaj distrikto estis adekvate informita. En du urboj – Kėdainiai kaj Biržai – okazis solenaj inaŭguroj de la ekspozicio kun partopreno de la prezidanto de LEA. Tiu agado daŭros ankoraŭ dum kelkaj jaroj dum kiuj la ekspozicio vizitos ĉiujn 60 distriktajn urbojn de Litovio kaj, kompreneble, aliajn gravajn urbojn.

2. La dua grava kaj senprecedenca agado estis la daŭrigo de publikigo de la intervjuoj kun Litoviaj esperantistoj kaj de iliaj artikoloj en la tutlanda retejo “Mano kraštas”. LEA en ĉi tiu retejo havas konstante funkciantan apartan rubrikon. Dum la jaro en ĝi aperis pliaj 80 intervjuoj kaj artikoloj kaj entute ĝis nun aperis jam 195 tiaj tekstoj el 32 urboj de Litovio. La agado daŭras. Ni intencas publikigi ankoraŭ kelkajn dekojn de tiaspecaj publikaĵoj kaj surbaze de ili prepari kaj eldoni apartan libron. La dua etapo de tiu projekto estos publikigo de biografioj de famaj forpasintaj Litoviaj esperantistoj. En la sama retejo ĉi-jare estis finpublikigita reta kurso de Esperanto. Ĝi konsistas el 40 lecionoj, preparitaj de Gražina Opulskienė kaj Aida Čižikaitė.

3. Litoviaj esperantistoj aktive aliĝis al la projekto-kampanjo de UEA kaj EEU por antaŭenigi Esperanton en la Eŭropa Unio kadre de la eŭropunia Konferenco pri la estonteco de Eŭropo. Tiu kampanjo daŭros ĝis marto 2022. Ĝis nun el 606 subtenoj de la projekto 32 estas de Litoviaj esperantistoj. Ni planas atingi ankoraŭ kelkajn dekojn. Ankaŭ ni laboros kun Litoviaj politikistoj kaj funkciuloj, kiuj membras en speciala laborgrupo de la Eŭropa Unio por laboro de tiu Konferenco.

4. Grava agaddirekto estas la intensa prepariĝo al la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos en Klajpedo la 9-17an de julio 2022. Ni jam havas pli ol cent aliĝintojn el 18 landoj. Ni celas atingi 500 partoprenantojn el 30-40 landoj. La aktualigataj informoj pri ĉi tiu grava evento estas troveblaj en la retejo de BET-56 kaj en speciala rubriko en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*.

En la raporto estis menciitaj kelkaj pliaj agadoj, ekzemple:

Krom diversaj publikaĵoj pri Esperanto en la Litovia reta kaj papera gazetaro grandan informan signifon havis vasta informado pri la romano *Vojaĝo* de Rugilė Aūdenienė. Aŭtune la aŭtorino pro sia romano ricevis la premion Liudas Dovydenas, kiun ĉiujare atribuas Asocio de Litoviaj verkistoj pro la plej aktuala romano. La premio estas 5000 eŭroj.

En la libro de Juozas Kundrotas *Knygos aūra* pri la unua privata nuntempa eldono en Kaŭno *Ryto varpas* tuta ĉapitro estas dediĉita al kunlaboro de ĉi tiu eldonejo kun LEA, laŭ kies rekomendo *Ryto varpas* eldonis 12 librojn en kaj pri Esperanto.

Senpere antaŭ la kongreso de LEA aperis la libro *Bibliografijos rodyklė* (Bibliografia indikilo) de la elstara litova esperantisto Vytautas Šilas. Ĝi entenas liajn publikaĵojn dum 1961-2017.

La litova esperantisto Antanas Vaitkevičius dum kelkaj jaroj ĉiumonate publikigas tradukojn de litova literaturo en la bitrevuo *Turka Stelo*. Ĉi-jare en la sama revuo siajn humuraĵojn komencis aperigi ankaŭ Laimundas Abromas.

Malgraŭ la pandemio ankaŭ ĉi-jare okazis jam la 14a seminario de Litoviaj ĵurnalistoj-esperantistoj en Aukštadvaris.

En julio eklaboris nova respondeca sekretario de LEA Asta Nastaravičiūtė, kiun la kongreso konfirmis en tiu posteno.

Fine de la kongreso estis gratulitaj la jubileulinoj Emilija Rapkevičiūtė, Vaidilutė Martuzevičienė kaj Tatjana Šilienė.

Post la kongreso dum la Zamenhof-Tagoj 2021 la ĉefa programero estis la prelego de Vytaŭtas Šilas “Esperanto-poetoj kaj elstaraj versfarantoj de Litova tero”. Ĝin variigis deklamado de kelkaj versaĵoj de tiuj poetoj kaj versfarantoj fare de Nijolė Žambaitė kaj Inita Tamošiūnienė. Sekvis tre detala prezento de la sekvontjara BET-56 en Klajpedo.

Funkciis riĉa libroservo kaj aliaj giĉetoj. Pluraj personoj aliĝis al BET-56.

Fine de la programo por ĉiuj estis prezentita koncerto de la poeto kaj bardo Edmundas Janušaitis.

La jaron ni finas plenaj je optimismo kaj espero pri la sekva pli rezultodona kaj enhavoriĉa jaro.

Povilas Jegorovas
prezidanto de Litova Esperanto-Asocio



Afriko. La asocio Nova Familio, aganta en Goma (Demokratia Respubliko Kongo) la 19an de decembro festis la Zamenhof-tagon kun la prizorgataj georfoj. La partoprenantoj kunmanĝis, dancis kaj fine faris grupfoton.

Montrealo: Ne-Zoom-a Zam-Festo!

“Mi ne povas kredi, ke jam pasis preskaŭ du jaroj ekde nia lasta ĉeesta festo ĉi tie!” – mi pensis irante al la restoracio “Resto Végo”, nia kutima Esperanto-kunvenejo. Nia lasta renkontiĝo en ĝi devintus okazi la 13an de marto 2020... Mi ne devas diri al vi, kio okazis poste...

La Montrealaj Zamenhof-festoj en la antaŭKOVIMA tempo estis famaj tra Kana-do – kelkdeko da homoj el Montrealo kaj la regiono, kaj sufiĉe ofte eĉ kelkaj “honoraj montrealanoj” – vizitantoj de apudaj ŝtatoj en Usono! Preskaŭ ĉiam estis muziko – ofte viva – prezentaĵoj, kunkantado kaj multe da rido. La virtualaj kunvenoj estis tre sukcesaj komence – sed mi sentas, ke iom post iom homoj komencis laciĝi de ili, kaj ke la retaj kunvenoj neniam vere anstataŭis la realajn renkontiĝojn Montrealo.

Ni estis 16 aŭ 20, se oni enkalkulas la pluŝajn bestojn kaj la portreton de Zamenhof. Tamen, laŭ mi, tute bela nombro, konsiderante, ke ankoraŭ ne ĉiuj el ni estas komfortaj renkontiĝi grupe, eĉ se la restoracioj en Kebekio sekvas striktajn KOVIM-protokolojn: ekzemple, vi devas montri la vakcin-pasporton por eniri, oni sidas pli dise ol antaŭe (ne pli ol 10 homoj ĉirkaŭ unu tablo), kaj ankaŭ konsiderante, ke multaj devas resti hejme ĉar estis kazo de KOVIM por iu, kiun oni kontaktis en lernejo, laborejo ktp. Kaj eble kelkaj aliaj simple “elfalis” el la kutimo kunveni. Do, eĉ se nia Zamenhof-festo estis modesta laŭ niaj antaŭaj “antaŭkovimaj” normoj, por mi persone ĝi sentiĝis kiel festego de amikeco, plej granda kaj mirinda, eĉ se ni devis iom alkutimiĝi ne brakumi kaj ne kis-saluti amikojn.

Ni starigis la tablon por la freŝaj eldonoj de ESK – kaj tiajn ni havas multajn! Estis



tri libroj, kiujn ni preparis por la UK-2020: klasika rakonto el Franca Kanado *Maria Chapdelaine* de Louis Hémon tradukita de Trefleo Mercier. Plus, la du libroj freŝe verkita de du: *Besta Verbaro* de Normando Fleury (ĉu vi sciis, ke krom la vorto “krokodili” nia lingvo havas ankaŭ aliajn bestajn verbojn – ekzemple, kangurui?), kaj la ĉarmaj rakontoj pri birdoj kaj Esperanto-vojaĝoj: *Birdoj en Nia Korto* de Zdravka Metz. Pluraj el tiuj libroj (kaj ĉiuj lotumitaj KD-oj!) malaperis!

La distra programo komenciĝis per la prezento de tri libroj de bonega Esperanto-verkisto Sten Johansson fare de Normando Fleury, la prezidanto de la LKK, kiu ankaŭ afable disponigis la librojn al ĉiuj, kiuj volis ilin legi. La torĉon transprenis Minjo Renaud, kiu bonege legis poemon de Kalocsay. Sekvis rakonto de Francisko Lorrain (redaktoro de la lasta eldono de *La Eta Princo*) pri persono, kiu loĝis en flughaveno, timante reveni hejmen pro la koronaviruso – estis, fakte, tute vera historio! Poste Zdravka Metz (respondeculino pri ekskursoj de la LKK) parolis pri, eble, la plej fama verkisto el Danio, Andersen, kaj la imponega dikvoluma traduko de liaj fabeloj en Esperanto. La esperantistaro aplaŭdis kaj ridegis, kiam Garry Evans, LKK-kasisto, majstre aktoris kun botelo da vino la faman poemon de William Auld *Ebrio* (spektebla ĉe <https://www.facebook.com/EsperantoQuebec/videos/877846016257178>).

Poste François Bolduc, kongresa kuracisto por la Montreala UK kaj agema Montreala aktivulo, prezentis du bonegajn projektojn: la ĵusan koncerton en Esperanto de la fama kebekia muzikisto kaj nova esperantisto Yves Desrosiers, sponsoritan de INK kaj donacitan al ĉiuj membroj de UEA, kaj INK mem: Internacian Novelo-Konkurson. INK estas inter plej sukcesaj novaj internaciaj projektoj en Esperantujo, iniciatita de kebekianoj por la UK-2020 kaj lanĉita en 2020 por instigi homojn verki. La temo por 2020 estis “KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin” (la temo estis, efektive, proponita de mi mem kaj elektita per reta voĉdonado). Oni ricevis sepdekon da noveloj en la unua eldono de la konkurso, plus preskaŭ dudekon da nekonkursantaj noveloj. INK, cetere, jam preparas sian duan eldonon kaj tenas intereson de ĉiuj per ĉiumonataj atelieroj de Bobelarto <https://bobelarto.ink/>.

Mi mem daŭrigis la temon de INK, leginte unu el siaj nekonkursantaj noveloj: la amuzan mikronovelon *Faruno* (temas pri la frua tempo de KOVIM, kiam el la vendejoj malaperis kelkaj bazaj eroj kaj tio memorigis al mi la tempon de perestrojko en mia naskiĝlando). Por la sekva ero mi devis transformi min per la surmeto de malnova tukokravato kaj ĉapelo, kaj fariĝi S-ro William Mann el Britio, kiu akompanis Zamenhof-on dum lia longa Nord-Amerika Odiseado, kiam li vizitis nian kontinenton por la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto. Ĉu vi scias, ke dum tiu vojaĝo li vizitis Montrealon, la urbon de la UK-2022? “William” ekscite parolis pri la vojaĝo kaj eĉ prenis demandojn pri ĝi de la aŭskultantoj! Mi enamiĝis al s-ro Mann,

Iĝu amiko de “La Ondo de Esperanto”!

legante lian raporton pri la vojaĝo en 1910, kiu aperis en *La Brita Esperantisto*. Nun mi verkas teatraĵon, kiu baziĝas sur tiu ĉi rakonto.

Ni finis la vesperon per iom da kantado – ĉar kiu Zamenhof-festo eblas sen kantado? Ni kantis la montrealigitan version de *Adeste Fideles* kaj, kompreneble, *La Esperon*. Mi ne registris nian kantadon – ĉar kiel diris unu el la partoprenantoj, jen la ĝojo de la ĉeestaj kunvenoj – ne ĉio estas registrita kaj sur la ekranon!

Mi revenis hejmen laca kaj feliĉa, revidinte tiom da karaj geamikoj. Mi ege esperas ke la situacio permesos al ni daŭre kunveni ĉeeste – ni dezirus tion fari dufoje monate: unu fojon ĉeeste kaj alian fojon virtuale tra 2022. Kaj ni esperas, ke la UK 2022, same kiel tiu ĉi unua ĉeesta Zamenhof-festo ekde KOVIM, estos aparta kaj sukcesa, ĉar ni ja ĉiuj tiom sopiras finfine revidi niajn amikojn ne nur sur ekranon, sed reale, en Montrealo!

Ĵenja Amis

La lingvo de unueco – Zamenhofa TAGO 2021

Okaze de la naskiĝtago de L. Zamenhof, la iniciatoro de Esperanto, ni demandis al homoj de la tuta mondo pri la signifo de unueco hodiaŭ kaj pri la rolo de Esperanto en ĝi. Spektu la filmeton *Kio estas por vi unueco?* <https://youtu.be/kv-r3y99e74> kaj helpu nin disvastigi ĝin!

Iĝu parto de nia tutmonda komunumo kaj subtenu la junularan Esperanto-movadon per membriĝo en TEJO: <https://www.tejo.org/>

Laŭ www.tejo.org



Moskvanoj festas Zamenhof-Tagon

La 13an de decembro Arina Osipova kaj Oleg Ĉajka organizis en sia oficejo (“Lingvo Connect”) festan vesperon okaze de la Zamenhof-Tago. Venis maksimuma kvanto da homoj por komforte dislokiĝi en la ejo: deko da konataj esperantistoj, gastino el Germanio, kelkaj bone parolantaj gejunuloj kaj du komencantoj.

La programon komencis Nikolao Gudskov per sia 15-minuta prelego “Zamenhof kiel politika pensulo” pri la Zamenhofa artikolo “Post la granda milito. Letero al diplomatoj”. La temo estas grava kaj aktuala: ĝi direktas nin al la Deklaracio pri homaj rajtoj, dokumento kiu evoluigas la homaranismajn ideojn de nia Majstro. Poste Nikolao laŭtleĝis du novajn novjarajn poemojn de Klara Ilutoviĉ.

Sekvis paŭzo por frandi regalaĵojn, preparitajn de la mastroj, kaj interparoli. Svetlana Smetanina okazigis tradician festan aŭkcion kun malalta starta prezo por ĉiuj lotaĵoj (100 rubloj), inter kiuj estis sufiĉe utilaj libroj. La ĉefaj gajnintoj estis la novicoj.

La plej distra kaj samtempe kleriga parto de la kunveno estis la kvizo pri Zamenhof, kiun preparis kaj gvidis Arina kaj Oleg. Dank’ al ĝi ni eksciis, ekzemple, ke Zamenhof naskiĝis jaŭde. La demandoj estis kroĉitaj al bombonoj kaj ĉiu respondinto ricevis bildkarton kun foto de Zamenhof. La kunveno finiĝis per kantado de Oleg Ĉajka kaj Mikaelo Povorin, al kiu aliĝis ĉiuj partoprenantoj, inkluzive la novulojn.

Dankon al la mastroj pro la bonega festo!

Irina Gonĉarova



Konatiĝu kun Aloyzas Gudavičius

Ekde oktobro en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* estas prezentataj personoj, kiuj kontribuos al la programo de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazos la 9-17an de julio 2022 en Klajpedo (Litovio). La unua prezentato estis profesoro Aloyzas Gudavičius el Ŝiauliai.

Aloyzas Gudavičius naskiĝis en 1940. Li doktoriĝis en 1970 kaj habilitiĝis en 1990. Dum 1991-97 li estis rektoro de la Ŝiauliai-a Universitato, kaj dum 1998-2007 – prezidanto de la universitata senato. Liaj ĉefaj lingvistikaj esplorkampoj estas semantiko kaj etnolingvistiko, pri kiuj li publikigis multajn artikolojn en litovaj kaj eksterlandaj sciencaj eldonaĵoj, inkluzive de la monografiaj *Kompara semantiko de la litova kaj rusa lingvoj* (1985, en la rusa), *Etnolingvistiko* (2000, 2009, en la litova), *Kompara semantiko* (2007, en la litova). En 2012-14 prof. Gudavičius gvidis la sciencajn projektojn pri koncepta metaforologio, kies ĉefa rezulto estis vortaro de konceptaj metaforoj en publika diskurso (2014). Ekde 1994 li estis organizanto de internaciaj konferencoj “Mondaspekto en la lingvo” kaj ĉefredaktoro de la scienca revuo *Filologija*. Ĝis 2018 li laboris kiel profesoro en la katedro pri fremdaj lingvoj, instruis kurson de etnolingvistiko kaj praktikan kurson de la pola lingvo, en la doktoranta studprogramo li gvidis kurson de leksika semantiko. En 2012 li iĝis Honora Civitano de la urbo Ŝiauliai.

Aloyzas Gudavičius lernis Esperanton en la studenta aĝo kaj partoprenis en BET-oj kaj aliaj esperantistaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Dum pluraj jaroj li estis vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Kelkfoje li gvidis liberelekteblan kurson pri interlingvistiko en magistrigaj filologiaj studprogramoj. En 2002 aperis lia litovlingva libro *Enkonduko en interlingvistikon* por studentoj kaj por pli vasta rondo de interesiĝantoj. En 2005 li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato dum la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. En 2009 prof. Gudavičius pro siaj interlingvistikaj meritoj ricevis la internacian premion Academicus Ariste.

En BET-56 Aloyzas Gudavičius gvidos la kurson de la litovaj lingvo kaj kulturo. Kursanoj konatiĝos kun fundamentoj de la litova lingvo (fonetiko, leksiko, gramatiko), lernos bazajn litovajn vortojn kaj la plej oftajn ĉiutagajn esprimojn. Samtempe oni preparolos la plej gravajn trajtojn de la litovaj historio kaj kulturo.




Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



La 2an de oktobro 2021 en Tjumeno geedziĝis Maria Lisandra Gonzalez Hurtado kaj Stanislav Belov. Ni deziras al la nova internacia paro feliĉan kaj longan vivon, kaj esperas, ke nia redakciano Stanislav daŭre kontribuos al “La Ondo” per siaj interesaj kaj bonege legataj artikoloj!

Bonvenon al Armenio: sugestoj por vojaĝantoj

La pandemio rompis la kutiman vivmanieron, inkluzive la tradiciajn turismajn itinerojn. Sed tio estas bona ŝanco por viziti novajn lokojn, pri kiuj vi apenaŭ eĉ ekpensus antaŭe. Inter ili sendube estas Armenio – antikva lando kun bela naturo kaj unika kultura heredaĵo. Kaj ĝi plu akceptas eksterlandajn vizitantojn! Mi vizitis ĝin fine de 2021 kun mia familio kaj pretas doni kelkajn praktikajn sugestojn.

Kiel eniri

Armenio troviĝas en Suda Kaŭkazio, ĉirkaŭita de Turkio, Kartvelio, Azerbajĝano kaj Irano. Oni povas veni surtere (el Kartvelio aŭ Irano) aŭ per aviadilo. La limoj kun Azerbajĝano kaj Turkio estas fermitaj jam preskaŭ tridek jarojn. Ĉe alveno necesas prezenti negativan kronvirusan teston faritan ene de 72 horoj aŭ atestilon pri kompletea vakcinado. La dokumentoj devas esti en la armena, angla aŭ rusa. Vizoj por civitanoj de multaj landoj riceveblas en elektronika formo. Sed zorgu pri tio anticipe – aranĝado de vizoj ĉe la alveno estis ĉesigita pro la pandemio!

ĤorVirap kaj Ararato (MrAndrew47, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=2375507>)



Kion kunpreni

Armenio estas sufiĉe moderna lando, kvankam subevoluinta kompare al Ruslando kaj Eŭropo. Plejparton de necesajoj oni povas aĉeti surloke, ja vendejoj abundas kaj funkcias same kiel en Ruslando – de matene ĝis vespere, sen paŭzoj kaj ripoztagoj. Akcepteblas ĉiuj ĉefaj bankokartoj, bankmaŝinoj abundas, sed plejparte iom arkaikaj – senkontaktaj aparatoj malmultas, do necesas enigi la karton.

Ankaŭ apotekoj abundas, plejparton de kuraciloj oni povas aĉeti sen preskriboj. Tamen se vi bezonas ion specifan kaj vive gravan, prefere kunportu tion, ĉar multaj kuraciloj simple ne estas atestitaj por loka merkato, kaj iujn lokaj farmaciistoj tute ne konas, dum iliaj similaĵoj mankas (ni spertis tion). Kuraciloj plejparte venas el Ruslando, do ili havas priskribojn en la rusa.

Sekureco

En januaro 2021 la magazino *Global Finance* publikigis rangoliston de landoj rilate sekurecon. Armenio okupis la 62an lokon (Usono – la 65an, Ruslando – la 108an). Dum tri semajnoj ni vagadis en tiu ĉi lando, vizitante diversajn lokojn, kaj neniam spertis iujn problemojn tiukampe. En la centro de Erevano polico abundegas, policajtoj staras je okulvida distanco, kaj patroloj deĵoras ĉiupaŝe.

La politika situacio estas malstabila, sed tio apenaŭ endanĝerigas vizitantojn. Dufoje ni ĉeestis kontraŭregistarajn manifestaciojn – ni fotis, filmis kaj aŭskultis oratorojn. Neniu el la protestantoj atentis nin, nek policanojn, kiuj dense ĉirkaŭas tiajn lokojn.

Ĉe limo kun Azerbajĝano foje okazas interpafado, sed temas pri interpuŝiĝoj de militistoj en montaro, apenaŭ aŭdebla eĉ en apudaj setlejoj. En plej milite vundebraj regionoj (lime de Azerbajĝano kaj Turkio) estas deplojitaj ruslandaj militistoj kaj limgardistoj, kio garantias, ke okazos neniu invado, nek gravaj ĉelimaj bataloj.

Lingva situacio

Preskaŭ ĉiuj signaĵoj kaj surskriboj estas nur en la armena lingvo, nur foje en la rusa aŭ angla. Pli maljuna generacio kaj edukitaj homoj bone parolas la rusan, gejunuloj ofte kapablas interkomunikiĝi nur armene, kvankam iuj bone konas ankaŭ la rusan kaj anglan. Taksiiistoj kaj farmaciistoj sufiĉe bone parolas ruse, same kiel pluraj aliaj homoj en la serva industrio.

Servoj

Funkcias eksterlandaj taksiaj servoj Yandex Go (Ruslando), DiDi (Ĉinio), Uber, do oni povas uzi kutimajn aplikaĵojn kaj pagi per karto. Pagoj en vendejoj akcepteblas

per kartoj aŭ armenaj dramoj (1 usona dolaro = 490 armenaj dramoj), kiujn oni povas aĉeti en monŝanĝejoj aŭ preni el bankmaŝino. Mapoj de Yandex kaj Guglo havas informojn pri pluraj manĝejoj, muzeoj, vendejoj ktp, plejparte aktualajn. La publika transporto estas subevoluinta kaj konsistas el busetoj, itineraĵoj taksioj kaj trolebusoj.

En Erevano funkcias metroo, kiu apenaŭ rimarkeblas, ĉar ĝi konsistas el nur dek stacioj, la lasta el kiuj estis konstruita en 1996. En la ĉefurbo preskaŭ ĉiam estas trafikŝtopiĝoj, parkumi aŭton malfacilas pro manko de liberaj lokoj. Ŝoforoj stiras ne tre akurate, trafikreguloj estas grandparte ignorataj.

Telefonio funkcias bone, plej popularaj estas la ruslandaj kompanioj MTS kaj Beeline, kies SIM-kartojn oni povas aĉeti jam en la flughaveno Zvartnoc. Telefonio kostas malmulte, kaj la poŝtelefona interreto funkcias bone. La kabla televido proponas kelkcent kanalojn ĉefe en la armena kaj rusa. Eksterlandaj filmoj kaj animaciaĵoj estas dublataj krom la ruslingvaj, kiuj estas dissendataj kun originala sontrako.

Kion gustumi

Triopon de gustumendaj armenaj bongustaĵoj, laŭ mia opinio, konsistigas konjako, lavaŝo kaj lokaj fruktaĵoj kiel ekzemple ĉurĉĥelo (miksaĵo de densigita frukta suko kaj nuksoj metitaj sur ŝnuron).

La plej granda elekteblo de konjakoj estas en butiko de la fabriko "Ararat". Tie oni povas aĉeti ankaŭ kelkajn speciojn de konjako, kiuj ne estas liverataj eksterlanden, kaj por iuj el ili eblas printigi surloke etiketon kun laŭplaĉa teksto, tuj surgluotan. En Sjunika provinco granda elekteblo de vinoj kaj konjako haveblas en la vilaĝo Areni, kie loka fabriko produktas ambaŭ drinkaĵojn kaj vendas ilin en butiko apud sia impona stokejo.

Avinoj en bazaretoj ĉe turismaj lokoj proponas grandan varion da hejmfaritaj frandaĵoj – de drinkaĵoj ĝis fruktaĵoj. Vojrande oni povas vidi virinojn, kiuj bakas lavaŝon en tandiroj – argilaj fornoj enfositaj subteren tiel, ke bakisto plonĝas tien preskaŭ tutkorpe por alglui ĵusmodlitan flanon kaj post kelkdek sekundoj elpreni ĝin. Fruktoj abundas kaj bongustas eĉ vintre. La sola problemo estas, ke foje oni ne scias pri kio temas, do necesas skani armenan etiketon per maŝintradukilo aŭ pene interkompreniĝi kun lokanoj, serĉante similaĵon en lingvo konata al ili.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

De kie fontos la nova movado?

de Ian Fantom

Stanislav Belov en sia artikolo “Disiĝi por kuniĝi: Meditoj de nemovadano pri la estonteco de la Esperanto-movado” (*La Ondo de Esperanto*, 2021, №3, p. 46-51) realece pri-skribas la veran staton de la nuntempa Esperanto-agado. Ankaŭ mi nuntempe konsideras min nemovadano, simple pro tio, ke ne plu ekzistas Esperanto-movado. Mi aliĝis al UEA kaj al mia landa asocio en 1962 kiel juna, entuziasma movadano, kiam ambaŭ organizaĵoj estis plene okupataj pri la antaŭenigo de la lingvo, kaj pli grave de la ekzistokialo de la lingvo – la tielnomata “interna ideo”.


Mi gvidis la informadon de la landa asocio en la fruaj sepdekaj jaroj, kiam mia teamo atingis plimultan subtenon por Esperanto en la elektita ĉambro de la brita parlamento. Ene de tri jaroj ni triobligis la nombron de gazetaraj artikoloj, kiuj menciis Esperanton, ĝis 985, kaj tio sekvis sukcesan jaron de la UK en Londono en 1971, en kiu mi gvidis la kongresan informadon. Mi ofte utiligis la bultenojn de la Internacia Gazetara Servo de UEA, celitajn por uzo de la informistoj en la landaj asocioj. Tiuj eventoj demonstris la kernan rolon kiun devus havi la landaj asocioj en la akceptigo de Esperanto, kaj la eblecojn kiuj estis malfermaj al ili.

Do kio okazis intertempe al la movado?

Nova Epoko, Nova Pensado

En 1999 kaj 2000 mi prelegis kaj verkis pri la temo “Nova Epoko, Nova Pensado”. Esence mi diris, ke ne gravas al mi, se la membro-nombroj malkreskas, kondiĉe ke restas la ĝustaj membroj. En la nova epoko eblis esperantumi sen la Esperanto-asocioj. Ju pli da homoj volas uzi Esperanton pro ties utilo des pli bone, sed paralele kun tio pliiĝos la eblecoj por varbi aktivajn movadanojn, kiuj volas premagadi por enkonduki ĝeneralan instruadon de Esperanto en la lernejoj. Tamen tio, kion mi tiutempe vidis en mia landa asocio, estis la malo; la nombroj malkreskis daŭre jam ok jarojn, kaj tiuj kiuj forlasas estas ĝenerale la plej entuziasmaj movadanoj. Ili senreviĝis pro la kreskanta burokrateco kiu transprenis la asocion.

Mi metis la tezon, ke aŭ la Esperanto-asocioj povos ekspluati la novajn eblecojn kiuj aperas, aŭ ili povos esence ignori ilin. Mi montris, kiel ili povos uzi la Interreton por antaŭenigi siajn celojn, kaj eĉ montris, kiel ili povos per tio gajni amasan subtenon de ordinaraj homoj, kiuj simpatias kun la celoj sed ne volas tro enplektiĝi. Tiuj eblecoj nuntempe estas evidentaj. Se ili ignoras tiujn eblecojn ili



velkos. Miaj prelegoj ĉe la Brita Kongreso en 1999 kaj en la Londona Esperanto-Klubo en la komenco de 2000 estis entuziasme akceptitaj de preskaŭ ĉiuj. Tamen mi rimarkis en la kongresa prelego, ke la Prezidanto de la landa asocio aspektis videble enuita. En la sama kongreso la gvidanto de la Publica Komitato anoncis, ke ili ne plu traktos kun la Esperanta Parlamenta Grupo, ĉar ili estas registrita bonfara organizaĵo kaj ne rajtas okupiĝi pri politiko. Mi plendis al la Prezidanto, kiu ĝentile respondis, sed faris nenion. Tiel la parlamenta grupo, kiun ni starigis en 1972 estis mortigita.

En 2006 mi estis la celo de personaj atakoj fare de gvidantoj de la Estraro de la landa asocio, kaj tiuj aperis sur la paĝoj de ilia gazeto *EAB Update*. Tamen la vortumon oni devas zorge legi por kompreni, ke la afero ne estis tia, kian oni povus unue supozi. Dum la antaŭa jaro mi mem estis membro de la Estraro, kaj la rolo kiun ili donis al mi – sendiskute – estis esplori pri la falado de la membronombroj dum la pasintaj jaroj. Tion mi diligente faris, sed mi estis edukita en fiziko, kaj mi sciis provi ne influi la situacion, kiun mi samtempe provas observi. Pro tio mi ne parolis pri miaj eltrovaĵoj dum la esploroj. Mi ne nur observis la homojn, sed mi ankaŭ detale studis kaj dokumentis ĉiujn protokolerojn por la antaŭaj 15 jaroj. En unu kunveno, la Kasisto (Estrarano pri Financoj) demandis, ĉu ni reregistriĝu sub la DatumProtekta Akto, kiam ŝajne tio ne necesas por membrara asocio. Mi demandis, kial ni registriĝis en la komenco. Tiam komenciĝis la piroteknikaĵoj; neniu el ili sciis, ke mi jam vidis la protokolon pri la origina decido kaj memoris ĝin en tiu kunveno. “Ĉar oni diris al ni, ke ni devas”, – ŝi respondis, persiste. “Tion ne diras la protokolo”, – mi respondis. Aliaj intervenis por kulpigi min pri “konduito”. La afero daŭris dum la cetero de mia ĉeesto en la Estraro, kresĉendante ĝis kulmino en la lasta kunsido, en februaro 2006. Kiam mi produktis transskribon de la interŝanĝo, la Kasisto respondis: “Ne estas la enhavo; estas la tono”. Surbaze de tio ili rezolucii voki por mia “tuja suspendiĝo”. Ili sciis, ke nur la membraro rajtas suspendi kuratoron sen juraj proceduroj. Tamen la Prezidanto en sia parolado donis impreson, ke mi estis suspendita, en sia alparolo antaŭ la voĉdonado en la Jarkunveno de 2006. Kiam ni vere havis Esperanto-movadon la membroj nepre ne estus tolerintaj situacion en kiu la Prezidanto, kiam li mem estis kandidato por la nova komitato, prezidu super la voĉdonado, kaj nepre ne, ke li el la prezida sidloko denuncu alian kandidaton. Ili fundamente ŝanĝiĝis.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Pli ol 50 fotoj pri la 23a Sovetia Esperantista Junulara Tendaro, okazinta antaŭ 40 jaroj en Uzbekistano, aperis en la nova ruslingva ĵurnalo de Aleksander Korĵenkov, dediĉita al vivo esperantista en Soveta Unio. La fotojn garnas klarigoj kaj tiutempaj ruslingvaj kaj Esperantaj artikoloj. Pliaj publikaĵoj baldaŭ sekvos.

Legu, spektu, komentu ĉe <https://kronikisto.livejournal.com>

Lingva Komitato (LK, 1921-48) kaj AdE (1922-67), la plej longtempa prezidanto de AdE (1937-63), aŭtoro de *La evoluo de la telefonio* (1928), *Historio kaj organizo de la Esperanto-movado* (1932), *Pri la vortfarado en Esperanto* (1959) k. a., honora membro de UEA (1934).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 138-139.

21. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Jevgenij Iosifoviĉ Miĥalskij** (Михальский, 1897-1911-1937), sovetunia bibliotekisto, instruisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Eŭgeno Miĥalski; kunfondinto de Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj (1931), membro de LK (1932-37), talenta poeto, aŭtoro de la poemaroj *La Unua Ondo* (1918), *Du Poemoj* (1922), *Prologo* (1929), *Fajro kuracas* (1932) kaj *Kantoj de amo kaj sopiro* (1934); en 1994 aperis lia *Plena poemaro*, kompilita de W. Auld.

29. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Belka Beleva** (Белева, 1927-1957-2012), bulgara aktorino, instruistino en Teatra Akademio en Sofio, kaj esperantistino; prezidanto de la Sofia Esperanto-Societo (1979-81), gvidanto de la Virina Komisiono de BEA (1975-86), membro de la Virina Komisiono de UEA (1978-82); unu el la plej konataj aktorinoj en Esperanto, rolinta, interalie, en dekoj da spektakloj de Bulgara Esperanto-Teatro ekde ties fondo (1958) kaj en Internacia Arta Teatro; aŭtorino de la membiografia libro *Teatro sen lingva bariero: Travivitaj rememoroj* (1986); honora membro de UEA (1996).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 31-32.

Aleksander Korĵenkov



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>



SEJT-23: Pli ol 50 fotoj de antaŭ 40 jaroj

Antaŭ kvardek jaroj, la 14-25an de aŭgusto 1981 en la ripozejo “Sukok”, je 50 kilometroj de Taŝkento, okazis SEJT-23 (Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) – la plej amasa esperantista renkontiĝo, okazinta en la orienta parto de Sovetunio kun pli ol 300 partoprenantoj. Okaze de ĉi tiu “ronda dato” en la nova ruslingva pri-esperanta vivĵurnalo de la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* aperis ampleksa fotoraporto kun pli ol kvindek fotoj, enkonduko kaj klarigoj (foje netrivialaj).

Legu kaj spektu en du sinsekvaj artikoloj ĉe <https://kronikisto.livejournal.com/>

Ĉi tiuj fotoj fontas ne nur el la arkivo de la *Onda* redaktoro, sed ankaŭ el la kolektoj de Tatjana Ĉuĥleb (tiam: Kiseljova), Svetlana Birjukova kaj Vjaĉeslav Gusev. Pri subskriboj kaj identigo de la fotitoj okupiĝis la tri fotintoj kun la helpo de Irina Abramoviĉ, Aleksej Birjulin, Anatolij Ionesov, Natalja Ŝoroĥova k. a.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Dudeko da paĝoj el la kulta romaneto “Moskvo – Petuŝki” de Venedikt Jerofejev, tradukitaj de Aleksander Korĵenkov, fermas la serion, en kiu estis prezentitaj dek rusaj roman(et)oj, verkitaj dum la 20a jarcento (antaŭ la perestrojko). Veturu kun Veniĉka al Petuŝki, “kie birdoj ĉesas kanti nek tage, nek nokte, kie nek vintre, nek somere ĉesas flori jasmeno”.

Moskvo – Petuŝki

Poemo

de Venedikt Jerofejev



AVIZO DE LA AŬTORO

La unua eldono de “Moskvo – Petuŝki¹” rapide elĉerpiĝis danke al la unuekzemplera eldonkvanto. De tiu tempo mi ricevis multajn riproĉojn pro la ĉapitro “Serpo kaj Martelo – Karaĉarovo”, sed tute senkaŭze. En la enkonduko al la unua eldono mi ja avertis ĉiujn junulinojn, ke la ĉapitron “Serpo kaj Martelo – Karaĉarovo” oni devas preterlasi, ne legante, ĉar la frazon “Kaj senprokraste fortrinkis” sekvas unu paĝo kaj duono da nura sakraĵo, kaj ke en ĉi tiu ĉapitro estas neniu maltabua vorto, escepte de la frazo “Kaj senprokraste fortrinkis”. Per ĉi tiu honesta avizo mi atingis nur tion, ke ĉiuj legantoj, precipe la junulinoj, tuj eklegis la ĉapitron “Serpo kaj Martelo – Karaĉarovo”, eĉ ne leginte la antaŭajn ĉapitrojn, eĉ ne leginte la frazon “Kaj senprokraste fortrinkis”. Pro tio mi konsideris necesa en la dua eldono elfleti el la ĉapitro “Serpo kaj Martelo – Karaĉarovo” la tutan sakraĵon, kiu en ĝi estis. Tiel estas pli bone, ĉar, unue, oni legos min senpreterlase, kaj due, oni ne estos ofendita.

V. Jer.

*Al Vadim Tiĥonov²,
mia amata unuenaskito,
la aŭtoro dediĉas
ĉi tiujn tragikajn paĝojn.*

MOSKVO. SURVOJE AL LA KURSKA STACIDOMO

Ĉiuj parolas: Kremlo, Kremlo³. De ĉiuj mi aŭdis parolojn pri ĝi, sed mi mem neniam vidis ĝin. Kiomfoje (milfoje), drinkinta aŭ postebria, mi trairis Moskvon de nordo al sudo, de okcidento al oriento, de unu ekstremo al la alia, rekte kaj iel-tiel — sed mi neniam vidis Kremlon.

Jen ankaŭ hieraŭ mi ne vidis ĝin, sed mi ja la tutan vesperon turniĝis ĉirkaŭ tiuj

lokoj, kaj mi ja ne estis tre ebria: ĵus elirinte el la Savjlova stacidomo⁴, mi komence trinkis glason da zubrovko⁵, ĉar mi proprasperte scias, ke oni ankoraŭ ne elpensis pli bonan matenan dekokton.

Do, glaso da zubrovko. Kaj poste, ĉe la strato Kaljajevskaja estis plia glaso, ne da zubrovko, sed da koriandra⁶. Unu el miaj konatoj diris, ke la koriandra efikas sur la homon malhumane: do, fortigante ĉiujn membrojn, ĝi malfortigas la animon⁷. Tamen al mi ial okazis male, do, la animo plej altgrade fortiĝis, sed la membroj malfortiĝis, tamen mi konsentas, ke ankaŭ tio estas malhumana. Pro tio en la sama loko, ĉe Kaljajevskaja, mi aldonis ankoraŭ du kruĉojn da biero “Ĵiguljovskoje”⁸ kaj botelon da “Alb de dessert”⁹, kiun mi trinkis el la botelkolo.

Vi certe demandos: kaj poste, Veniĉka, kaj poste — kion vi trinkis? Sed mi mem ne scias certe, kion mi trinkis. Mi memoras — tion mi tre klare memoras — ke en la Ĉeĥova strato mi trinkis du glasojn da ĉasista¹⁰. Sed ĉu mi povis transiri la Ĝardenan Ringon, trinkinte nenion? Ne povis. Do, mi trinkis ankoraŭ ion.

Kaj poste mi ekiris en la centron, ĉar ĉiam rezultas same: serĉante Kremlon, mi nepre venas al la Kurska stacidomo¹¹. Fakte mi ja devis iri al la Kurska stacidomo, sed ne al Kremlo, tamen mi iris en la centron por almenaŭ unu fojon rigardi al Kremlo, pensante: ja mi tutegale vidos neniun Kremlon, sed venos rekte al la Kurska stacidomo.

Nun mi tre domaĝas, preskaŭ ĝislarme. Mi domaĝas certe ne pro tio, ke hieraŭ mi ne venis al la Kurska stacidomo. (Bagatele: hieraŭ ne venis — hodiaŭ venos.) Kaj certe ne pro tio, ke mi vekiĝis matene en iu nekonata ŝtuparejo¹² (evidentiĝis, ke hieraŭ en tiu ŝtuparejo mi sidiĝis sur ŝtupon, laŭkalkule sur la kvardekan de sube, alpremisa al la koro mian valizeton — kaj do ekdormis). Ne, ne pro tio mi domaĝas. Mi domaĝas pro jena kialo: mi ĵus kalkulis, ke inter la Ĉeĥova strato kaj tiu ŝtuparejo mi fordrinkis ankoraŭ ses rublojn¹³. Sed kion kaj kie mi trinkis? Kaj en kiu sinsekvo? Ĉu mi trinkis por mia bono aŭ por malbono?¹⁴ Neniu scias tion, kaj neniu iam ekscios. Ja ni ĝis nun ne scias: ĉu la caro Boriso murdis la caridon Demetron, aŭ male?¹⁵

Mi ĝis nun tute ne havas ideon, en kiu domo estis tiu ŝtuparejo, kaj tiel devus esti. Ĉio tiel. Ĉio en la mondo devas okazi malrapide kaj malĝuste, por ke la homo ne eksentu fieron, por ke la homo estu trista kaj konfuzita.

Mi eliris al la libera aero post la mateniĝo. Ĉiuj scias — ĉiuj, kiuj en senkonscia stato trafis en ŝtuparejon, kaj ĉe la mateniĝo eliris el ĝi, — ĉiuj scias, kian pezon en la koro mi portis tra ĉi tiuj kvardek ŝtupoj de fremda ŝtuparejo, kaj kian pezon mi elportis al la aero.

“Ne gravas, ne gravas, — mi diris al mi mem, — ne gravas. Jen estas apoteko, ĉu vi vidas? Kaj jen pederulo¹⁶ en bruna jako skrapas la trotuaron. Ankaŭ tion vi vidas. Do, trankviliĝu. Ĉio okazas, kiel devas okazi. Se vi, Veniĉka, volas iri maldekstren, iru maldekstren, mi al nenio devigas vin. Se vi volas iri dekstren — iru dekstren.

Mi ekiris dekstren, iomete ŝanceliĝante pro la frostoj kaj afliktoj, jes, pro la frostoj

kaj aflikto. Ho, ĉi tiu matena pezaĵo en la koro! Ho, nepercepteble de l' katastrofo! Ho, neripareblo! Kio pli multas en ĝi, en ĉi pezaĵo, al kiu ankoraŭ neniu sukcesis doni la nomon, kio pli multas en ĝi: ĉu paralizo aŭ naŭzo? Ĉu elĉerpiĝo de l' nervoj aŭ mortiga angoro ie apud la koro? Kaj se ĉio estas en egaleco, tamen kio pli multas: ĉu katalepsio aŭ febro?

“Ne gravas, ne gravas, — mi diris al mi mem, — ŝirmu vin kontraŭ la vento kaj nehaste iru. Kaj spiru neofte, tiel neofte. Spiru tiel, ke la genuoj ne kunfrapiĝu. Kaj iru ien ajn. Ne gravas kien. Ja eĉ se vi iros maldekstren — vi venos al la Kurska stacidomo; se rekten — tutegale al la Kurska stacidomo. Iru do dekstren, por veni al ĝi senerare”.

Ho, vaneco! Ho, efemereco! Ho, la plej senfortiga kaj malhonora tempo en la vivo de mia popolo — la tempo ekde la mateniĝo ĝis la malfermo de l' vendejoj¹⁷. Kiom da kromaj grizaj haroj ĝi enplektis en ĉiun el ni, al la senhejmaj kaj sopirantaj brunuloj! Iru, Veniĉka, iru.

MOSKVO. LA PLACO DE LA KURSKA STACIDOMO

Jes, mi ja sciis tion, kiam mi parolis: se vi iros dekstren, vi nepre venos al la Kurska stacidomo. Vi ja enuis en ĉi tiuj stratetoj. Veniĉka, vi ekvolis vantecon — do ricevu vian vantecon...

— Aĥ, lasu tion, — mi forsvingis min mem, — ĉu mi bezonas vian vantecon? Ĉu mi bezonas viajn homojn. Ja eĉ Redemptoro mem, kaj eĉ al sia propra Panjo estis dirinta: “Kio vi estas por mi?”¹⁸ Des pli mi — kio estas por mi ĉi tiuj homoj vantaj kaj tedaj?

Prefere mi apogu min al kolono kaj fermu la okulojn por ke estu malpli naŭze...

— *Certe Veniĉka, certe*, — iuj en la alto kantis tiel mallaŭte, tiel tenere-tenere, — *fermu la okulojn, por ke estu ne tiel naŭze*.

— Ho! Mi rekonas. La anĝeloj de Sinjoro! Ĉu estas vi denove?

— *Jes ja, certe, ni*, — kaj denove ili respondis tiel tenere!..

— Ĉu vi scias tion, anĝeloj? — ankaŭ mi demandis tre mallaŭte.

— *Kion?* — la anĝeloj respondis...

— Estas peze al mi...

— *Ni ja scias, ke peze*, — la anĝeloj kantis. — *Sed vi iom promenu, estos malpli peze, kaj post duonhoro malfermiĝos la vendejo: vere, vodko tie vendatas ekde la naŭa, sed ruĝan vinon oni tuj donos.*¹⁹

— Ruĝan?

— *Ruĝan*, — ĉante ripetis la anĝeloj de Sinjoro.

— Malvarmetan?

— *Malvarmetan, certe...*

Ho, kiel mi emociiĝis!..

— Vi diras: promenu, promenu, estos malpli peze. Sed eĉ promeni mi ne deziras. Vi ja mem scias, kio estas promeni en mia stato!..

Responde al tio la anĝeloj iom silentis. Kaj poste denove ekkantis:

— *Sed vi faru tion: venu al la stacidoma restoracio. Eble tie io estas. Hieraŭ vespere tie estis ŝereo²⁰. Ja ili ne povis vespere fortrinki la tutan ŝereon!..*

— Jes, jes, jes. Mi iros. Mi tuj iros por ekscii. Dankon al vi, anĝeloj!

Ili kantis tre mallaŭte:

— *Estu sana, Venja...*

Kaj poste tre tenere:

— *Ne dankinde...*

Kiaj ĉarmaj ili estas!.. Jes... Mi do iru. Estas tre bone, ke hieraŭ mi aĉetis donacojn, ja mi ne veturu al Petuŝki sen donacoj. Al Petuŝki tute ne eblas veni sen donacoj. La anĝeloj vekis en mia memoro la donacojn, ĉar tiuj, por kiuj ili estas aĉetitaj, mem estas kiel anĝeloj. Estas bone, ke mi aĉetis... Sed kiam vi aĉetis ilin hieraŭ? Rememoru... Iru kaj provu rememori...

Mi ekiris tra la placo — pli ĝuste, mi ne ekiris, sed treniĝis. Du aŭ tri fojojn mi haltis kaj rigidiĝis por malakrigi la naŭzon en mi. Ja en la homo estas ne nur la fizika flanko; en li estas ankaŭ la spirita flanko, kaj — eĉ pli grave — en li estas la mistika, superspirita flanko. Kaj do mi ĉiumomente atendis, ke meze de l' placo la naŭzo vomigos min tra ĉiuj tri flankoj. Kaj mi denove haltis kaj rigidiĝis.

— Do kiam vi hieraŭ aĉetis viajn donacojn? Ĉu post la ĉasista? Ne. Post la ĉasista mi tute ne povus pensi pri la donacoj. Ĉu inter la unua kaj dua glasoj da ĉasista? Ankaŭ ne. Inter ili estis nur trideksekunda paŭzo, kaj mi ne estas superhomo por dum tridek sekundoj sukcesi fari ion. Ja ankaŭ la superhomo estus falinta planken post la unua glaso da ĉasista, eĉ ne trinkinte la duan... Sed kiam do? Ho, kompatema Dio, kiom da misteroj estas en la mondo! Nepenetrebla vualo da misteroj! Ĉu antaŭ la koriandra, aŭ inter la biero kaj “Alb de dessert”?

MOSKVO. LA RESTORACIO DE LA KURSKA STACIDOMO

Ne, nur ne inter la biero kaj “Alb de dessert”, ja tiam estis absolute neniu paŭzo. Sed antaŭ la koriandra? Tio estas tre probabla. Pli ĝuste jene: antaŭ la koriandra mi aĉetis la nuksojn, kaj la bombonojn post ĝi. Kaj eble male: trinkinte la koriandran, mi...

— Estas neniu drinkaĵo, — diris la pordisto²¹ kaj cirkaŭrigardis min, la tutan, kiel mortintan birdeton aŭ malpuran ranunkolon.

“Neniu drinkaĵo!!!”

Kvankam mi tute kunpremiĝis pro la despero, mi sukcesis balbuti, ke mi venis tute ne por tio. Ĉu mi ne povintus veni por alia celo? Eble, mia ekspresa trajno al Permo iukiale ne deziras iri al Permo, kaj do mi venis ĉi tien por manĝi bœuf Stroganoff²² kaj aŭskulti kantadon de Ivan Kozlovskij²³ aŭ ion el “La Sevila barbiro”.

Mi plu kunhavis mian valizeton kaj, same kiel hieraŭ en la ŝtuparejo, mi alpremis ĝin al la koro, atendante la mendon.

Neniu drinkaĵo! Ĉiela Reĝino! Sed, se kredi la anĝelojn, ŝereo neniam mankis ĉi tie. Kaj nun estas nur muziko, kaj eĉ muziko kun iuj hundaĉaj moduladoj. Efektive, kantas ĝuste Ivan Kozlovskij, mi tuj rekonis, ja ne ekzistas voĉo pli abomena ol la lia. La voĉoj de ĉiuj kantistoj estas egale abomenaj, sed ĉiu voĉo estas siaspece abomena. Pro tio mi facile distingas ilin dum la aŭskultado... Jes, certe, Ivan Kozlovskij... “Ho-o-o, kaliko de l' prapatroj... Ho-o-o, mi satrigardu vin sub la no-o-oktaj steloj”... Jes, certe, Ivan Kozlovskij... “Ho-o-o kial estas mi de vi ĉa-a-armita... Min ne forla-a-asu”...

— Ĉu vi mendos ion?

— Sed ĉu ĉe vi estas nur muziko?

— Kial “nur muziko”. Estas bœuf Stroganoff, kukaĵo, bovina mamaĵo...

La naŭzo denove atakis min.

— Kaj ŝereo?

— Kaj ŝereo mankas.

— Interese. Mamaĵo estas, sed ŝereo mankas.

— Tre interese. Jes. Ŝereo mankas, sed mamaĵo estas!

Oni forlasis min. Por redukti la naŭzon, mi komencis rigardi al la lustro super mia kapo.

Bona lustro. Sed tro peza. Se ĝi nun dekreĉiĝus kaj falus sur ies kapon, estus terura doloro... Sed ne, probable, neniu doloro: ja dum ĝi dekreĉiĝas kaj flugas, vi sidas kaj, suspektante nenion malbonan, trinkas, ekzemple, ŝereon. Kaj kiam ĝi atingas vin — vi tuj iĝas malviva. Peza estas ĉi tiu penso: vi sidas, kaj sur vin de supro lustro falas. Tre peza penso.

Sed ne, kial peza?.. Se vi, ekzemple, trinkas ŝereon, se vi jam kuracis la postebriion, ĉi tiu penso ne estas tre peza... Sed se vi sidas post hieraŭa trodrinkado, kaj se vi ankoraŭ ne kuracis vian postebrion, kaj oni ne donas al vi ŝereon, kaj krome lustro falas sur vian kapon — jen tio estas peza... Tre deprima penso. Penso, kiun ne ĉiu kapablas elporti. Precipe post hieraŭa trodrinkado...

Sed ĉu vi konsentus, se oni proponus al vi jenon: ni tuj alportos 800 gramojn da ŝereo, kaj kompanse pro tio ni dekreĉos la lustron super via kapo kaj...

— Nu, ĉu vi decidis? Ĉu vi mendos ion?

— Jes, bonvolu 800 gramojn da ŝereo.

— Sed vi jam videble ebrias! Al vi estas ruslingve dirite: ni ne havas ŝereon!

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vilaĝa historio

de Laimundas Abromas



Homojn proksimigas la amo kaj biero, sed por tiuj aferoj oni bezonas bonan sanon. Tamen ni tutegale sidas en la bierejo. Tie ni cerbumas. Profunde kaj enhave. Pri la homo inter la homoj. Longe ni pesis la faktojn kaj finfine ni kaptis la veron: la sorto estas kruela. Al iuj ĝi malavaras, sed al aliaj...

Kaj iĝas malgaje, kiam la preterirantaj homoj ĵetas al ni:

– Pro kio vi sidas ĉi tie, malzorgemaj neglektuloj? Kiujn vi priridas, sinjoroj? Al falsaj aŭguristoj venos nigraj tagoj! Ĉu vi havas nenion por fari?

Tiu estas la instruisto Salomono. Same li demandis ankaŭ hieraŭ. Verŝajne, konfuziĝis lia psikologia ekvilibro. Nia vira interparolo rompiĝis. Ni sidas silente. Post certa tempo ni komencas nervoziĝi, ĉar, kiel multaj homoj, ni ne kapablas silenti. Tial li, Salomono, en ĉi tiu silento, ke ĉiuj klare aŭdu, diris:

– Esperantistoj venos! Tiam vi vidos, kio okazos. – Li frapfermis la pordon kaj forlasis la bierejon. Ni nur ekridis. Tia estas la sorto de la nuntempa klerulo.

Unu nokton furiozis ŝtormo, kaj matene la virinoj, serĉante fungojn trovis gazeton, verŝajne alportitan de vento el la urbo. De malproksime vidiĝis grandaj literoj “Heroldo de Esperanto”. Vekriante, la fungoserĉantinoj fuĝis el la arbaro kaj reveninte kolektiĝis en la bierejo. Tie jam sidis la tuta vilaĝa elito. La vilaĝestro Vaivada tralegis la strangajn vortojn, kaj ial ekstremis liaj manoj.

– Kion signifas tio?

La virinoj kuntiriĝis. Nur la policisto Kontrimas, kiu el ĉiuj amaskomunikiloj plej malfidis la virinojn, komencis ilin insulti:

– Senhontulinoj! Alportis ĉi tien diversan makulaturon!

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La Diaj donacoj

de Jean-Luc Tortel



Ĉi-tiun matenon Dio estis en bona humoro. Li ĵus finis sian inspektadon de la galaksio Lakta Vojo per vizito de la planedo Tero, kaj preparis sin por sekva vojaĝo al la najbara galaksio Andromedo. Senfina tasko, en tiuj miliardoj da galaksioj, kun miliardoj kaj miliardoj da enaj steloj, kaj krome nedirebla nombro da planedoj. Li do plirapidis.

Pri Tero li nur duone kontentis. “Mi devus fari ion plian por la bono de tiuj stultuloj, la teranoj, sed kion?” li pensis. Tiam li vokis sian ĉefan mesaĝiston:

– Iru al Tero, mi petas, kaj anoncu mian donacon al la enloĝantoj: mi de nun malaperigas ĉiujn malsanojn!

La mesaĝisto rigardis sian mastron kun admiro, disigis siajn grandajn blankajn flugilojn kaj foriris.

Dio havis multon por pensi; tamen li trovis, ke la mesaĝisto revene malfruas. “Tia tasko tre facila ne bezonas tiom da tempo...” li pensis. Fine reaperis la sendito.

– Kian tempon mi atendis! Ne forgesu, ke ni devas tuj ekiri Andromedon. Kvan-kam nia grupo veturas je la rapido de la penso, ni bezonas ian tempon; Andromedo ja situas je pli ol du milionoj da “lumjaroj”, kiel kalkulas la teranoj.

La mesaĝisto ne respondis. Li rigardadis siajn piedojn, ne levante la kapon. Dio streĉis la brovojn:

– Ĉu io ne glatis?

La servisto hezitis kaj fine respondis: “La Teranoj ne akceptis vian donacon, Mastro Moŝto...”


Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La tereno

de Paulo Sérgio Viana



Estis pluveta lundo kun griza ĉielo kaj malvarma venteto. Luko vekigis frue, post misdormita nokto, sin lavis, englutis malnovan sensukeran kafon, kiu restis de hieraŭ en la termosoj. La amara gusto de la trinkaĵo agacis lian buŝon, sed iom vigligis lin. Li senbrue malfermis la pordon de la domaĉo, kie plu dorme kuŝis la edzino kaj la bebo.

“Hodiaŭ mi nepre devas havigi al mi iom da mono”, li angore pensis. “Nepre, eĉ se mi devos almozpeti!”

Hieraŭ ili manĝis la restintajn rizon kaj fazeolon, tiel ke jam nenio troviĝas por la hodiaŭa kuirado. Ankaŭ malfermita estis la lasta botelo da lakto. Luko mem sufiĉe forte rezistis la malsaton, sed ke liaj edzino kaj bebo malsatos, jen tio estos netolereble dolora.

“Eĉ se almozpeti...”

Luko neniam antaŭe almozpetis. Li dum jaroj laboris en fabriko, kiel purigisto. Minimuman salajron li pergajnis, sed per saĝa administrado, fare de la komprenema edzino, ili neniam malsatis. Nun la situacio estis ekstrema. Li maldungiĝis antaŭ kelkaj monatoj. En la unua tempo li ricevis monon de la publika asekuro, sed tio jam estingiĝis, antaŭ ol li sukcesis denove trovi laboron. Lastatempe li pergajnis mizere, plenumante disajn laborojn pro favoro de kompatemaj riĉuloj: jen li purigis ĝardenon, jen li lavis aŭtojn, jen li helpis farbi muron, tiel ke etaj monsumoj gutis, tagon post tago. Apenaŭ sufiĉaj por la tuja manĝo de la edzino kaj bebo. Li mem foje manĝis nur malmolan panon, unufoje en la tago.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Abdulrazak Gurnah

Jen mi skribas lian nomon por espereble ne plu forgesi ĝin: Abdulrazak Gurnah. Kio li estas? Verkisto, kiun mi ne konis antaŭ la sveda akademio anoncis, ke li meritas la literaturan Nobel-premion pro “senkompromisa kaj kompata zorgo pri la efikoj de koloniismo kaj la sorto de rifuĝintoj en la abismo inter kulturoj kaj kontinentoj”.

Nu bone. Estas tamen strange, ke la plej bona kaj premienda verkisto de la jaro estas samtempe unu el la malplej konataj (kaj legataj). Eĉ lia eldonejo konfesas, ke liaj verkoj ne vendiĝas bone. Ĝis nun Gurnah publikigis 10 romanojn. Du el ili estis kandidatoj por premioj. (Kaj inter ni dirite: mi fajfas pri nomumoj. Ĉiu povas fariĝi kandidato.)

La ĉi-jara laŭreato estas apenaŭ konata al la legantaro kaj al la premiodisdona elito, – sed ili estas akademianoj. Same kiel Glück en 2020, li estas aprezata en universitataj ebenturoj. Espereble, tio ne estos nova tendenco de la svedoj.


Tamen – eble ni povas kompreni la decidon kiel inviton malkovri legendan verkiston? (Kvankam mi daŭre pensas, ke la Nobela komitato ne funkcii kiel literaturaj skoltoj.)

Eble. Mi aĉetis lian romanon *Paradizo* (1994) por sperti, ĉu tio estas vere majstraĵo, kiun mi simple ĝis nun maltrafis.

En *Paradizo* ni sekvas la adoltiĝon de Jusuf en la unua jardeko de la pasinta jarcento ĝis la germanaj konkripcioj komence de la Unua Mondmilito. Gurnah prezentas kvazaŭ tranĉaĵojn de la ĉiutaga vivo. Ni sekvas fiaskan komercan ekspedicion, ĉio sencela, kaj iam la libro finiĝas.

La patro de Jusuf lombardas la knabon al riĉa komercanto. En la ĉefurbo Jusuf spertas multflankan rasismen. Ĉiu grupo havas antaŭjuĝojn kontraŭ ĉiu alia grupo. La germanaj koloniistoj estas ie, sed plejparte ekster la ĉiutaga vivo.

«La rakontoj, kiujn ni aŭdas pri ili. La batalado de ili en la sudo, la delikataj sabroj kaj la mirinde precizaj pafiloj, kiujn ili faras. Oni diras, ke ili povas manĝi metalon kaj havas potencon super la tero, sed mi ne povas kredi tion. Se ili povas manĝi metalon, kial ili ne kapablas manĝi nin kaj la tutan teron? Iliaj ŝipoj navigis tra ĉiuj konataj maroj kaj estas foje grandaj kiel eta urbo. Ĉu vi iam vidis unu el iliaj ŝipoj, seyyid? Mi vidis unu en Mombasa antaŭ kelkaj jaroj. Kiu instruis ilin fari tiujn aĵojn? Mi aŭdis, ke iliaj domoj estas faritaj el marmoraj plankoj, kiuj brilas kaj glimas tiom milde, ke vi preskaŭ deziras tiri vian tukon kelkajn colojn pli alten por eviti malsekiĝon. Plue ili aspektas kiel senhaŭtaj reptilioj kaj havas orajn harojn, kiel virinoj, aŭ tio estas tre malbona ŝerco. La unua, kiun mi vidis, sidis sur seĝo



sub arbo meze de arbaro. Mi flustris la nomon de la Ĉionpovanto, pensante ke mi estas en la ĉeesto de la malbono. Post momento mi komprenis, ke tiu fantoma estaĵo estis unu el la famaj jugantoj.

“Ĉu li parolis?”, demandis Jusuf.

“Ne vortojn konatajn al homa orelo”, diris Mohammed Abdalla. “Eble li rumoris, mi vidis haladzon de fumo veni el lia buŝo. Povas esti, ke ili estas ĝinnoj, ĉar Dio faris ilin el fajro”.

Jusuf komprenis, ke la mnyapara mokis lin, kaj li vidis rideton en la anguloj de la buŝo de omklo Aziz. “Se la ĝinnoj konstruis la piramidojn, kial ili ne kapablus konstrui ŝipojn tiom grandaj kiel urboj?”, demandis la komercanto».

Gurnah klarigas unu fojon la vortojn, kiel “mnyapara” (submastro) kaj “seyyid” (moŝto), kaj li atendas, ke vi memoras la nocion dum vi legas lian novelon. Mi devis fari etan glosaron por ne perdiĝi.

Nu, jen alia fragmento el la senornama prozo de Gurnah:

«Kiel la pordoj de la Paradizo”, diris Jusuf.

Ĥalil faris molan skeptikan brueton. Kaj kiu vivas en tiu Paradizo? Sovaĝuloj kaj ŝtelistoj, kiuj prirabas senkulpajn negocistojn kaj vendas siajn proprajn fratojn por ornamaĵoj. Ili estas sen Dio, aŭ religio, aŭ eĉ sen ĉiutaga kompatato, ĝuste kiel la sovaĝaj bestoj, kiuj vivas kun ili. Jusuf sciis, ke tiel la viroj invitis unu la alian refoje rakonti la historion de Ĉato, sed li daŭre silentis. Kiam li pensis pri ilia restado en la urbo de Ĉato, li ankaŭ pensis pri Bati kaj la sento de ŝia varma spiro sur lia kolo. Li sentis honton je la penso, ke Ĥalil ridus pri li, se li sciis.

“Kiel estis tiu diablo Mohammed Abdalla? Tiu sovaĝa sultano vere instruis lecionon al li, ĉu ne? Vi estis tie! Sed antaŭ tio... kion li faris antaŭ tio?” demandis Ĥalil. “Post ĉiu vojaĝo homoj revenas kun teruraj rakontoj. Vi konas lian reputacion koncerne virojn, ĉu ne?”

“Li traktis min afable”, Jusuf diris post momento. En la silento li vidis la mnyaparan danci en la fajrolumo, krevante de fanfaronado kaj orgojlo, kaj klopodante kaŝi la doloron en la ŝultro.

“Ne estu tiom fidema”, diris Ĥalil incitite. “Li estas danĝera ulo. Krome, ĉu vi vidis luphomojn? Certe vi vidis. Ne? Eble ili atendas pli profunde en la arbaro. Mi scias, ke ili estas famaj en tiu lando. Ĉu vi vidis iujn strangajn bestojn?”

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vortripeto kiel elemento de versfarado: Tri poemoj neordinaraj plus unu omaĝa



de Miguel Fernández

Laŭ *Parnasa gvidlibro*, en rim-poemo la rim-vortoj devas laŭeble disti unuj disde la aliaj morfologie kaj leksike. Nu, ĉi teorio povus aplikiĝi al versoj farataj de bonaj poetoj. Sed bonegaj povas permesi al si la aŭdacon majstre versi ne nur per proksimigo de la morfologio kaj la leksika agadkampo de la rim-vortoj, sed eĉ per ripeto de ili. Tielas la sekva paro da poemoj kaj ties aŭtoroj.

En Venecio, ekzistas ponto, sur kiu, en la noktoj, nudmamaj stratulinoj proponas siajn servojn. Tial, tiu ponto popole konatas kiel “la ponto de la mamoj”. Sub tiu titolo, kaj surbaze de tiu esprimo kaj de ties konsistigaj substantivoj kiel ĉefaj rim-elementoj, la andaluza poeto Rafael Alberti (1902-1999) kreis jenan poemon, aperintan en lia kolekto *Roma, peligro para caminantes* [Romo, danĝero por piedirantoj] (1968), kiun mi prezentas al vi en mia esperantigo:

LA PONTO DE LA MAMOJ

REMEMORATA EN ROMO

Ĉe la ponto de la mamoj,
venecianinoj fonas.
Mamoj ja, ne pomoj, kronas
nian ponton de la mamoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.
Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” deziras al la aŭtoroj kaj abonantoj de nia almanako kaj al la vizitantoj de nia novaĵretejo Gajan Kristnaskon kaj Bonan Jaron 2022!

Bildo el la publika festkolekto de “Shutterstock”.

Novjaraj ŝercoj

Kiam mi estis infano kaj jarfine malfermis fridujon, mia panjo ofte diris: “Ne tuŝu, tio estas por la Novjarfesto!” Nun mi mem diras tion al mia edzino, kiam ŝi malfermas monujon.

- Kial la judoj festas Novjaron aŭtune?
- En decembro abioj estas pli kostaj.

Junaĝo estas periodo, kiam vi jam ne kredas ke je Novjaro al vi venos Avo Frost, sed plu esperas ke venos lia nepino Neĝulino.

- Kien mi vojaĝu por bone festi Novjaron kontraŭ mil rubloj?
- Al la jaro 1970a.

– Ĉu vi jam preparis vin por renkonti Novjaron?
– Por kio? Novjaro estas kiel mia bopatrino – ĉu mi preparas min aŭ ne, ĝi tamen venos.

- Mi donacis al mia edzino vojaĝon al la Sejŝeloj.
- Kaj kion donacis ŝi al vi?
- Ŝi vere forflugis tien!

Du senhejmuloj babilas.

- Mi bone festis la Novjaron sur la centra placo – ĉiuj regalis min, ni dancis kune.
- Kaj mi devis resti hejme – iu idioto parkumis super kloaka luko.

Esperantisto telefonas al sia Siberia amiko:

- Kiel vi fartas?
- Ĉio en ordo, ni festenas. Estas nur minus 20, do sufiĉe komferte.
- Sed laŭ Interreto en Siberio estas jam minus 50!
- Nu, tio estas surstrate...

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelona). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Bjalistoka Esperanto-Societo, Piękna 3, 15-282 Białystok. Rete: kontakt@espero.bialystok.pl

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>